

La Brita Esperantisto

Septembro-Oktobro 1984



“La Verda Stelo” Stoke-on-Trent
84-07-18

S-ino Mollie Frazer, membro de la Klubo en N. Staffs, prezentas bukedon al s-ino Sue Reardon (maldekstre), kiu ĵus pendigis floran stelon memore al Zamenhof. (Foto: Harry Langley).

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

80/A Jaro, N-Ro 860

Septembro-Oktobro 1984

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £8.00 (£5.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn ‘Esperanto News’ kaj ‘La Brita Esperantisto’. Abono nur al “La Brita Esperantisto” estas £4.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, ‘intensive’ kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

ĈU ONI POVAS AMINDUMI PER ESPERANTO?

Ĉi tiu demando ne estas averto pri lasciva artikolo. Ĝi estas demando farita de ĵurnalisto per la angla. La tradukon mi mildigis por ne ŝoki legantojn. La preciza demando, tradukita laŭvorte, estis: “Ĉu vi povas fari amon per E-o?” Vi konstatos, ke la titolo ne estas la plej bona traduko de tiu demando. Sed ne estas mia celo paroli pri tradukarto!

Antaŭ nelonge nia klubo ricevis viziton de raportisto de la urba ĵurnalo. Ĝi aperas nun je vendredoj, ĉar tio sufiĉas por informi pri la nemultaj lokaj okazintaĵoj. Nia prezidanto forte strebis por konvinki al la redaktoro sendi raportiston kiu verkus artikolon pri la Klubo. Baldaŭ post la komenco de la jaro, post averto al la Prezidanto, dika viro kun ruĝaj nazo kaj vangoj venis al la Klubo. Jam komentinte pri la vetero, li elpoŝigis kajeron kaj komencis la intervjuon. Kiu elpensis Esperanton? Kiom da homoj parolas ĝin? Kiom da tempo oni bezonas por lerni ĝin? k.t.p., k.t.p. Niaj anoj fervore informis lin dum pli ol horo pri faktoj kiujn ni samideanoj bone scias. Tiam la sekretariino proponis al li tason da teo kaj la Prezidanto donacis al li libreton por lerni la lingvon. Trinkinte la teon la dikulo, per fotilo, fotografis iujn studentajn, aliajn babilantajn, ankoraŭ aliajn kantantajn, kaj fine iun skribantan esperantajn vortojn sur nigratabulo.

Je la fino de la kunveno kaj la kutimaj ĝis revidoj kaj bonaj noktoj, Adelino invitis lin veni al “La Ora Ŝafpelto”. Estis nur kvar verdaj drinkuloj je tiu vespero. Akceptante la proponon li diris, ke la vizito al la drinkejo ne estos parto de la intervjuo, kvazaŭ ni estus anoj de kontraŭ-alkohola sekto kaj pro tio ni drinkas nur kaŝe. Enirante la drinkejon ni ricevis la bonvenigon de la estro per la kutima “S’luton”. Kiam li vidis la raportiston li ekkriis: “Ĉu la verdaj viroj kaptis vin, Klif? Vi ne parolas tiun lingvaĉon ĉu?” Ni mendis, ricevis la vazojn

da stimulilo, iris en la kutiman angulon, la verda angulo almenaŭ dum jaŭdoj, kaj komencis babili. Klif, la raportisto, ne volis aŭdi pluan vorton pri literaturo, nek poezio, nek pri la finaĵoj -o kaj -a, nek tutmonda korespondado. Li estis scivolema pri internaciaj renkontiĝoj. La universalaj kongresoj kaptis lian imagon. Li vidis ilin kiel oportunajojn por amikiĝi kun fremdaj virinoj kiuj atendas avide la atenton de ruĝanaza kaj dika anglo.

Estis dum ni trinkis la trian rondon ke li faris la jam menciitan demandon. Evidentiĝis ke Adelino komprenis ĝin kiel: “Ĉu vi povas amori per E-o?”, ĉar ŝi respondis al li, ke por fari tion oni ne bezonas lingvon sed alian ilon! Klif tuj klarigis, ke li volis diri “amindumi”, sed li ne sciis ĉu troviĝas tiuj vortoj en la lingvo. Neniu montris al li, en la klubo, vorton kiu, laŭ li, similis al amo aŭ kiso, aŭ flirto. “Neniam oni instruas tiujn vortojn kiam oni studas fremdajn lingvojn!” li plendis. Ni provis konvinki lin, ke en E-o tiuj vortoj ne mankas, male, ke por la angla verbo “ami” ĝi havas tri vortojn! Oni klarigis al Klif, ke oni povas traduki lian demandon en tri manieroj, laŭ la preciza signifo. Adiaŭante li konfesis ne atendi ke Esperantistoj estas tiel bonaj kundrinkantoj kaj homoj kiuj bone ĝuas la mondajn agrablaĵojn!

La artikolo aperis post unu semajno. Ĝi estis sufiĉe longa, ilustrita per fotoĵo kiu montris al juna Nancio skribanta la finaĵojn sur la nigra tabulo. Kompreneble tiu donis al ni kialon por diskuti pri la prezentado de nia Klubo kaj ĉu ni donis al Klif bonan impreson pri ni, kaj ĉu lia raportado enportos novajn anojn al la Klubo. Ni diskutis la tutan vesperon kaj ne trovis respondon al la eterna demando: Kiamaniere prezenti Esperanton al la publiko? La demando pri la ebleco *fari amon* kaj la adiaŭaj komentoj de la raportisto montras, ke

multaj homoj ankoraŭ kredas nin kreitaĵoj iom for de la ĉiutaga vivo. Eble lokaj kluboj devos ne nur studi la lingvon sed ankaŭ meti en la programojn sociajn eventojn kiujn ni povos festi kun ne-Esperantistoj. Kompreneble, se oni volas influi parlamentanojn oni devas uzi argumentojn taŭgajn al la uzo de E-o en internaciaj rilatoj. Oni devas emfazi la literaturon kaj kulturon antaŭ edukistoj, la ekonomiajn eblecojn per ĝi antaŭ mono-konsciaj komercistoj kaj bankistoj, k.t.p., k.t.p. Lokaj grupoj agas antaŭ la publiko ĝenerale. Homoj ofte aliĝas al la kluboj por fari ion dum la vintraj vesperoj kaj E-o estas nova, iom nekutima, preskaŭ ekzotika afero. Ili pretas studi kondiĉe ke la studado ne estos peza kaj spicita per bonhumora amikeco. La *verdaj drinkemuloj* opinias, ke oni ankoraŭ ne studis, eĉ surface, kiel la lokaj kluboj naskiĝas, vivas plimalpli vigletan junecon, soporan mezaĝon kaj feblan tria-aĝon – novmoda eŭfemismo por maljunaĝo.

Se Klif decidus veni al nia Klubo kaj lerni la lingvon, estos pro tio kion li opinias farebla dum internaciaj renkontiĝoj!

Alariko

“La Verda Stelo” la 18an de julio, 1984

La Norda Staffordshire Klubo kunvenas ĉiujare ĉe la “Verda Stelo” apud Hanley por honori la kreinton de la internacia lingvo; la kutimo estis establita de nia karmemora Horace Barks. Ĉi-jare la festo okazis je la 18a de julio.

Krom lokaj membroj, ĉeestis esperantistoj el diversaj lokoj en Britujo, inkluzive membroj de IFEF. Ankaŭ ĉeestis vizitantoj el multaj landoj kiuj kunvenis por la 40a Internacia Junulara Kongreso en Swanwick.

La prezidanto de la Brita Sekcio de IFEF, Peter Harvey (Skotlando) salutis la kunvenon.

Reprezentantoj de la “Evening Sentinel”, Radio Stoke kaj Signal Radio ĉeestis kaj raportis pri la afero, kaj la

loka prezidanto, W. H. Simcock, atentigis pri la fakto, ke la junaj kongresanoj ĝuas la unikecon de Esperanto-internacia kongreso sen interpretistoj.

Pastro Petro Weatherby, prezidanto ĉe Swanwick, kaj Roberto Haddon, prezidanto de JEB, salutis en la nomo de TEJO.

Sinjinoro Sue Reardon, la edzino de la fama mondĉampiona *snooker*-ludanto, Ray Reardon, pendigis floran stelon memore al Zamenhof. Poste, la kunveno vizitis la lokan muzeon por vidi la buston de la pola fondinto.

FESTIVALO EN PARIZO

Kiel jam okazis pasintan jaron, Unuiĝo Franca por Esperanto organizos la 2an festivalon kanzon-/teatran de Parizo la lastan semajnfino de Novembro 1984, t.e. la 24an kaj la 25an.

Kvankam la definitiva programo ne jam estas certa, ni ricevis konsenton partopreni de Tespa (Teatro Esperanto de Parizo), de Suzanna, F. Chevrier, R. Bura, J. Le Puil kaj de la grupo Amplifiki. Sed estos certe kromaj eroj (i.a. la Ruza Kruĉo).

Kiel jam okazis pasintan jaron, la festivalo ne estos kutima esperanto-aranĝo, sed libervole partoprenebla kontraŭ enirpago (abono denove ebla). U.F.E. peros kontaktojn kun hoteloj.

SKRIBU AL DINAN

Por instigi al la Turisma Oficejo en Dinan, Bretonio, eldoni proponitan libreton, en Esperanto, pri la regiono, bonvolu skribi al la sekvonta adreso por peti ekzempleron:

S-ro Jean Damanne,
Turismo-Oficejo,
6, rue de l'Horloge,
22100 Dinan,
Bretonio, Francio.

S-ro Damanne, la oficejestro, favoras financan subtenon por la nove-formita loka Esperanto-Grupo, pri la libreto, sed lia administrantaro ne. Viaj petoj povus esti instigo.

LA SOCIOLOGIA BAZO DE LA UZO DE "CI"

Bernard Golden

En antaŭa artikolo (*La Brita Esperantisto*, majo-aŭgusto 1983, pĝ. 233-234) mi spuris la historion de "ci" en Esperanto, montrante, kiel d-ro Zamenhof eksperimentis per du duapersonaj pronomformoj kaj per unu sola. Post tiu hezitado li fine decidis, ke la problemoj rilate la uzon de "ci" estas tro grandaj pro la diverseco de etnolingvaj kutimoj kaj kontraŭkonsilis al esperantistoj uzi ĝin ĝenerale. "Ci", do, fariĝis, se ne mortnaskita, certe arkaikiĝinta elemento en la leksiko de Esperanto. Samopinias ankaŭ John C. Wells, kiu skribas: ". . . la pronomo *ci* estas aŭ arkaisma aŭ specialefeka . . ." (*Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*, 1978, pĝ. 61). Kiu volas sperti mucidan specialefekon de la uzado de "ci", legu la artikolon "Konu cian verdecon" sur paĝoj 231-232 de la ĉi-supre menciita numero de BE.

Ĉar "ci" estas Fundamentaĵo, ne estas eble tute elpeli ĝin el la lingvo. Kvankam la vasta plejmulto da esperantistoj ne bedaŭras, ke tiu pronomo eksmodiĝis, kaj estas tre kontenta uzi "vi" kiel duapersonan pronomon por alparoli iun ajn, tamen, de tempo la tempo aŭdiĝas voĉoj el diversaj anguloj de Esperantujo, kiuj sopiras al la uzo de "ci". Ĉu estas nur koincido, ke "Pledo por ci" estis publikigita en la januara-aprila (1983) numero de BE (pĝ. 210), kaj "Ci kaj vi" aperis en *Venezuela Stelo* (n-ro 28, marto 1983, pĝ. 4)? Ĉu la vidpunktoj de la respektivaj aŭtoroj, la pseŭdonimulo Alariko kaj Espartako Gabalda, estas manifestiĝo de iu tendenco, kiu nuntempe invadas Esperantujojn, simile al la agitado por forigo de la supersignoj aŭ kreo de triapersona komunseksa pronomo? Miaopinie temas pri efemeraj reformemaj fenomenoj, kiuj, same kiel en la pasin-

teco, formalaperos post iom da tempo sen atenci la lingvon.

Mi deziras substreki tiun ĉi punkton: senti la bezonon uzi "ci" ne estas lingva afero sed baziĝas sur socia kutimo. Kiu denaske uzas etnolingvon havantan duapersonan singularan (kaj ankaŭ pluralan) pronomon devigan en situacioj de familiareco aŭ intimeco, nepre sentas dum la tuta vivo bezonon uzi ĝin en la *gepatra lingvo*, sed estas alia demando, ĉu li same forte estas motivita en la kazo de lernita fremda lingvo aŭ *internacia lingvo*, precipe se en tiuj lingvoj mankas responda pronomo.

Ni imagu, ke proceso estas aranĝita, kaj kvar atestantoj, estas alvokitaj por defendi sian bezonon aŭ nebezonon uzi "ci" en Esperanto. En la gepatra lingvo de ĉiuj kvar troviĝas pronomo responda al "ci", do ĉiu atestanto en sia propra kultura ĉirkaŭmedio alkutimiĝis interciadi. Pli bone kvalifikitaj atestantoj apenaŭ estas troveblaj, tiom pli, ĉar ĉiu publikigis sian opinion pri la uzo de "ci". Unue ni komparu la vidpunktojn de du samnacionoj, István Szerdahelyi, kiu instruas Esperanton en la Universitato de Budapeŝto, kaj Kolomano Kalocsay, elstara beletristo kaj gramatikisto. En la pronomistemo de ilia denaska lingvo, la hungara, troviĝas ne nur duapersona singulara pronomo, *te*, responda al "ci", sed ankaŭ plurala formo, *ti*. Ambaŭ estas uzataj en situacioj de familiareco, kontraste kun du ĝentilaj pronomformoj, kiuj estas *triapersonaj*: *ön*, *önok* kaj *maga*, *maguk*. Por scii, kiam estas uzeb-laj tiuj pronomoj, estas necese havi bonan komprenon pri la interpersonaj rilatoj en specifaj sociaj situacioj; neniu gramatika regulo povas funkcii kiel gvidilo.

Szerdahelyi montras, ke li estas ciisto en la artikolo "Ci – ĉu mortnaskita"

(*Esperantologiaj Kajeroj* 1, 1976, pĝ. 133-135). Kvankam li konfesas, ke “ci” neniam estas uzata en vivaj parol-situacioj, kaj li mem ne uzas ĝin en okazoj, kiam li ciadas etnolingve, tamen, li argumentas, ke Esperanto, estante internacia lingvo, devas priatenti la strukturojn de aliaj lingvoj. En preskaŭ ĉiuj el ili troviĝas la kontrasto “ci/vi”, kaj per tiu paro oni esprimas sociajn interrilatojn de rango kaj intimeco. Pro tio Esperanto bezonas “ci”. Szerdahelyi nomas “vi” neŭtra kaj senkarakterata, dum “ci” havas afekcian nuancon, kaj li konkludas jene: “*ci* estas pure literatura kategorio, elemento de la skriba lingvo, kiu konvinke pruvas, ke inter la parola kaj la skriba stilo estas ne nur formala, sed ankaŭ enhava diferenco.”

Kalocsay defendas la viisman pozicion en *Lingvo Stilo Formo* (1931 kaj 1963, pĝ. 90-91). Li kategorie kondamnas “ci”, argumentante, ke (1) homoj, kies hejma lingvo estas Esperanto ne tre sentas la bezonon de “ci”, (2) li mem aŭdas en ĝi “fremdan, malagrablan siblon, kvazaŭ insulton”, kaj (3) ĝi malbone efikas pro psikologia kaŭzo, ĉar ĝi estas “nekutima, fremda elemento en la lingvo”, teoria lernolibra ero de la lingvo sen asociacioj, “seka, nekutima, fremda vorteto.” Lia drasta prijuĝo estas kvazaŭ prognozo: “La pronomon *ci* Zamenhof mortigis tuj post ĝia nasko. Mi estas certa, ke ĝi neniam reviviĝos. Ĝi ripozu do en paco!”

Nun ni eksciu la opinion de Zamenhof, kiu, inter ĉiuj atestantoj, havis la plej vastan sperton pri la parola uzo de pronomoj en diversaj lingvoj. Li flue parolis en la jida, rusa, pola kaj germana lingvoj; sekve de tio, li havis multajn okazojn uzi pronomojn respondajn al “ci” en sociaj situacioj. Pro tio li rimarkis, ke homoj sentas sin ĝenataj, kiam ili devas elekti inter “ci” kaj “vi”. La sekvaj citaĵoj venas el “Lingva Demando” titolita “Pri la pronomo “ci”, kiu aperis en *La Revuo* en 1908 (vidu n-ro 87, *Lingvaj Respondoj*, 6-a eldono, 1962, pĝ. 76-77).

“. . . tia “formo de ĝentileco” estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni devas nin turni al tiu aŭ alia persono (ekzemple al infano k.t.p.) . . .”

“Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur “vi”.”

“. . . post kelka praktiko oni tiel facile alkiutimiĝas al la uzado de “vi”, ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion “malvarman”. Ĉio dependas ja nur de la *kutimo*.”

Zamenhof prave emfazis la rolon de kutimo, kaj en Esperantujo jam de longe enradikiĝis la kutimo vidiri al ĉiuj.

La sekva membro de la viisma skolo, Frits Faulhaber el Nederlando, verkis tre detalan pritrakton de la demando (“Ĉu “ci” aŭ “vi”?” en *Esperanta Mozaiko*, 196?, pĝ. 68-71). Unue Faulhaber priskribas, kiel estas uzataj la du respondaj pronomoj en lia gepatra lingvo, la nederlanda, montrante, kiel ili akcentas imagitan diferencon en la socia vivo; temas pri la kategorioj de aĝo kaj klaso. Li nomas la “ci-vi-ludon” emocia dramo, kiam ne okazas plena reciprokeco inter du parolantoj; unu el la personoj ciumas, sed la alia viumas por insisti pri socia distanco inter la du. Faulhaber prave rimarkigas, ke la uzo de “ci” kaj “vi” en ĉiuj lingvoj havantaj ilin “postulas la arton de ĵonglado”. La aŭtoro, kiu uzis Esperanton kiel ĉiutagan lingvon, akcentas, ke neniam mankis al li “ci”. Per la sekvaj vortoj li plene kontraŭdiras la vidpunkton de Szerdahelyi.

Niaj samcelanoj ofte faras “problemojn” el lingvaĵoj, kiuj jam multajn jarojn estas ĝenerale uzataj sen ia geno. La “ci-vi-temo”, kiom ajn embarasa ofte en naciaj lingvoj, ne estas problemo en Esperanto. En nian lingvon internacian oni ne enkonduku naciismon!”

En tribunalaj procesoj ofte estas alvokitaj fakuloj por prezenti sian spertan opinion. Tia homo estas Otto Jespersen, la dana lingvisto, kiu estis la aŭtoro de la planlingvo *Novial*. Ankaŭ li

tuŝas la temon de demokrateco.

“Ne estas necese diferencigi en la singularo du gradojn de familiareco . . . internacia lingvo devas esti sufiĉe demokrata aŭ ĝentila por trakti ĉiun egale.” (*Eine Internationale Sprache*, 1928, pĝ. 74)

Estas evidente, ke “ci” eksmodiĝis en Esperanto, ne pro diktatoreca malpermeso, sed tutsimple, ĉar ĝi signifas nenion en *modernaj internaciaj sociaj rilatoj*, kiuj tendencas esti ĉiam pli demokrataj. Kiu proponas la uzon de “ci” en Esperanto agas same senrespondece kiel tiu, kiu enkondukas naciismojn en la strukturon kaj vortprovizon de la lingvo.

Ĉiutaga Esperanto

AKCIDENTO EN LA DOMO

“Kio estas al vi?”

“Mi falis sur la ŝtuparo”.

“Diable! Kio okazis?”

“Dum mi malsupreniris mi mispaŝis, kaj metis la piedon sur ŝtupon, kiu ne ekzistis. La halukso (*big toe*) de la dekstra piedo ricevis mian tutan pezon, kaj subfleksiĝis. Kia dolorego!”

“Oj, evidente!”

“Mi supozis, ke almenaŭ mi tordis (*sprained*) la halukson, kaj eble frakasis oston. La piedfingro ŝvelis ĝis ĝi aspektis kolbason. Mi konsultis (*looked it up in*) mian libron, kaj traktis la halukson kiel kazon de tordiĝo, sed mi havis dubon pri mia diagnozo.”

“Kaj do?”

“Do mi iris al mia ĝenerala kuracisto (*G.P.*) por ke li esploru (*examine*) ĝin. Unue, mi pensis, ke eble pli bone estus se mi telefonus por taksio, kaj tuj enirus la hospitalon, por ke en la fako de vizitantaj pacientoj (*out-patients' department*) oni radiografu (*x-ray*) ĝin. Bonŝance estis, ke mi ne tion faris!”

“Kial bonŝance?”

“Nu, en la loka kuracistejo (*surgery*) mi atendis nur duonhoron. Sed en la

hospitalo mi estus atendanta dum eble kvin horoj, kaj senprofite”.

“Mi ne komprenas”.

“Mi nek tordis nek frakasis la halukson”.

“Sed via kuracistejo ne enhavas radiografilon. Kiel do esplori?”

“Mi havis la saman opinion. Sed mia kuracisto havas preskaŭ sesdek jarojn – li edukiĝis en tempo, kiam kuracistoj devis diagnozi sen multe da komplikaj (*sophisticated*) aparatoj. Li prenis la halukson en la manojn kaj ĝin fleksis!”

“Oj! Vian doloron mi mem povas senti”.

“Mirakle, li ne dolorigis min. Se li fleksus ĝin supren-malsupren, tio estus turmento. Sed li fleksetis ĝin flanken-flanken, kaj mi preskaŭ nenion sentis. La diagnozo min mirigis”.

“Kion li diris?”

“Nek tordiĝo nek frakasiĝo. La forto de la frapo iom elpelis (*dislodged*) la ungon el sia kuŝejo, kaj la tuta halukso suferis profundan internan kontuziĝon (*bruising*). La kuracisto movetis la ungon per siaj fingroj, kaj ĝi klaketis. Tamen, mi absolute nenion sentis dum li tion faris”.

“Bonega kuracisto!”

“La plej lerta! Li preskribis unĝventon (*ointment*) por surŝmiri”.

“Ĉu unĝventon por profunda kontuziĝo?”

“Vere! Mi do demandis, kiel ĝi efikos, kaj la respondo estis tiel miriga kiel la diagnozo. Li diris, ke en ĝi estas enzimoj (*enzymes*), kiuj penetras la haŭton, kaj kaŭzas la formoviĝon de la sango interne elverŝita, ĉi-kaze de la halukso”.

“Vi blagas! (*You're having me on!*)

“Tute ne! Jen la tubeto. Ĝi estas germana produkto”.

“Mi kredis, ke vi estas amanto de naturaj rimedoj kontraŭ la malsano”.

“Ja prave! (*You're dead right!*) Antaŭ ol viziti la kuraciston mi glutis tablojdojn de simfido (*comfrey tablets*). Interne aŭ ekstere la simfido estas antikva rimedo kontraŭ kontuzoj, kaj ĝenerale stimulas la sanan kreskon de vunditaj histoj (*tis-*

sues).

“Do, vi portas kaj zonon kaj ŝelkon!”

“Kial fanatiki? Multe da drogherboj bone efikas, sed ankaŭ, la moderna medicino evoluigis plurajn bonajn medikamentojn. Generale, mi preferas la drogherbojn, ĉar ili malofte kromefikas (*cause side effects*), sed la kuraca periodo povas esti pli longa ol kiam oni uzas modernajn drogojn”.

“Ĉu li rekomendis sendolorigilojn?”

“Ne. Sed li konas min. Mi ĉiam havas ĉe mi tablojdojn de aspirino kaj kodeino (*codeine*). Tamen mi uzas ilin nur en okazo de vera bezono”.

“Vi estas stoikulo!”

“Ja ne. Sed se la doloro ne estas sufiĉa por min malatentigi pri aferoj, mi preferas ĝin toleri. Evidente, la doloro atentigas pri vundo aŭ malsano, kaj do oni ne faras idiotajojn”.

“Kiel fali sur ŝtuparo”.

“Ĝuste!”

Don Lord

Don Lord estos unu el tri gvidantoj de kursoj pri “Ĉiutaga Esperanto” kiuj okazos ĉe Knuston Hall, Northamptonshire, la 21an ĝis la 23a de septembro '84. Tuj petu inform-kaj aliĝilon de The Principal, Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants, NN9 7EU.

Al ili . . .

En dancado amikiĝas

Kore kore

Amikeco pliboniĝas

Hore hore

Je la fino de dancado

Kune kune

Man-en-mane ili staras

Ame ame

Apartigon nun atendas

Triste triste

Renkontiĝon ni esperas

Ie ie

M. E. Katinero

LEĜOJ DE MURPHY

Spertulo estas tiu, kiu scias pli kaj pli pri malpli kaj malpli, ĝis li scias absolute ĉion pri nenio.

La kvanto de homoj rigardantaj vin estas strikte proporcia al la stulteco de via ago.

Mezuru dufoje, ĉar tondi eblas nur unu fojon.

Ĉio eblas, krom skii tra ĝirpordo.

Por trovi la spertulon, prenu tiun, kiu antaŭdiras, ke la laboro daŭros plej longe kaj kostos plej multe.

Ŝparita groŝo estas – groŝo. (Laŭ la proverbo “A penny saved is a penny earned”).

Neniu nomo, kiom ajn simpla, povas esti senerare komprenita per telefono.

Diru al homo, ke en la universo troviĝas 300 bilionoj da steloj, kaj li kredos tion. Diru, ke sur benko estas malseka farbo, kaj li devos tuŝi por esti certa.

La longeco dependas de tio, ĉe kiu flanko de la banĉambra pordo oni estas.

– laŭ “*Esperanta Finnlando*”

SKRIBU AL FORTALEZA

Fortaleza, ĉefurbo de la brazila ŝtato Ceará, estas konata pro la vigleco kaj fortenco de sia E-movado, kiu ekzistas ekde 1964, subtenata de la loka Federacia Universitato. Bedaŭrinde oni konstatas lastatempe mankon de intereso flanke de la universitata estraro pri daŭrigo de tiu agado. Tial vi estas petata skribi leteron (prefere en Esperanto) al la nuna rektoro, petante, ke li pli taŭge prizorgu la aferojn rilatajn al la E-kurso de la Universitato, kaj tiel sentigi al li la gravecon kaj utilecon de la lingvo en la aktuala mondkulturo. Lia adreso: Lia rektora moŝto José Anchieta Esmeraldo Barreto, Avenida da Universidade 2853, 60.000 Fortaleza, Veará, Brazilo.

LA PROLOGO KAJ RAKONTO DE LA PARDONISTO

Geoffrey Chaucer

el la mezepoka angla trad. T. Fraser

Kaj se l' sendit' tuj faros la laboron,
Post noktoven' ni portos la trezoron
Al taŭga lok', laŭ sento kaj konveno;
Jen lotoj pugne pretaj por elpreno,
Nun prenu; trovu kiel al ni sortas'.
Kaj jen, la sorto la plej junan montras,
Do tuj li iris cele al la urbo.
Tuj post li foris laŭ la vojokurbo,
Jen unu tuj al la alia diris,
'Ni estas kiel fratoj – ni ĝin ĵuris.
El tio vian gajnon mi ekpruvas:
Vi vidas, tiu tria for sin movas
Dum ĉe ni oro kuŝas grandamase
Trionigenda – eĉ se embarase
Sed tamen, se mi povus bonaranĝi,
Ke al duonoj nur, la partojn ŝanĝi,
Jen estus al vi, ĉu, bonserv' amika?'
L' alia diris, 'Ŝajnas ja komplika;
Li scias ja, ke gardas ni ĉe l' oro,
Ni kiel faru? Kia la parolo?
'Ĉu inter ni nur?' diris la kanajlo,
'Klarigus mi sen multa vortotajlo
Ĉi planon mem, kaj kiel ĝin elfari'.
'Ne dubu min, mi pretas kun vi stari',
L' alia diris, 'kaj nepre ne perfidas'.
L' unua, 'Estas du el ni, vi vidas,
Kaj du, ol unu ja pli fortaj estas.
Atentu: kiam li kun ni re-restas,
Ekstaru kvazaŭ por kun li petoli.
Mi lin trapikos flanken sen paroli
Dum vi kun li laŭŝajne luktas lude,
Kaj poste vi lin piku finotute,
Post kiam jen, amiko mia kara,
Dividos l' oron ni laŭ rajt' egala,
Kaj poste ni plenumos la dezirojn,
Laŭ plaĉ' ludantaj kuboĵet-turnirojn'.
Kanajloj du, do tiel kun-konspiris
Por trian murdi, kiel jam mi diris.

Survoje urben, nia pleje juna
Volbrulis ade pri la ĉarmo kuna
De l' bela brilo de la or-florenoj.

'Ho Di', 'li spiris, en la brusto-enoj,
'Se estus tiu or' senmanke mia,
Neniu homo sub la trono Dia
Egalus al mi laŭ la viv' feliĉa!
Satano fine pleje ekmalica
Pensigis lin venenon jen aĉeti,
Por el la viv' la ĝen-amikojn ĵeti:
Kaj ĉar Satan' lin trovis peke vivi,
Permeso eblis, lin mizer-finigi,
Ĉar murdi ambaŭ estis la intenco
Sen ajn hezit', kompat', aŭ posta pento.
Do ek li kuris laŭ la krim-impeto
Enurben cele al la apoteko,
Kaj petis onin, aĵon al li vendi
Por siajn ĝenajn ratojn tuj veneni,
Kaj eĉ putoron, kiu liakorte
Kaponojn liajn prede ĉasas morte.
Li ŝatus venĝi kontraŭ l' aĉaj bestoj:
Detru' necesas, vanus ja protestoj!
Respondis la drogist', 'De mi vi havos
Venenon; kiel nepre Kristo savos
Animon mian, tiel io viva,
Trinkinte ion el ĝi ajn deriva,
Ekmortos nepre eĉ nur post guteto
De ĝi glutita; kvazaŭ de stileto –
Almenaŭ, mortos antaŭ ol vi povus
Mejleton kuri eĉ se streĉe provus,
Ĝi estas tiel forta kaj rapida.'
Ekprenis tuj ĉi homo malbenita
La tokson. Alistraten nun li kuris
Kaj tri botelojn grandajn tie pruntis.
En du botelojn tokson li enverŝis,
L' alian por si pura li konservis:
Necesos por li trink- kaj manĝ-aĵstoko
Por penlabori tra la tuta nokto
Portante l' oron for de tiu loko:
Post kiam – fi! lin trafu sortomoko –
La tri botelojn li plenigis vine
Por kviti nepre pri l' kunuloj fine.

Nu, kial plie predikadi tede?
Ĉar ĝuste kiel ili planis prede,
Tutlaŭe du la junan murdis pike.
Postfare, unu diris jam soife,
'Ni sidu nun kaj trinku jam feliĉe
Kaj poste kovru lin en ter' sufiĉe'.
Dumdire ĉi murdinto laŭ hazardo
Venenbotelon prenis sen rigardo,
Kaj verŝis ankaŭ por la krim-amiko:
Do trinkis ambaŭ. Sekvis mortefiko.

(Finota)

LAŬ MIA OPINIO . . .

68a Brita Kongreso

Ĉu vi bonvolus enmeti ĉi tion por sciigi al viaj legantoj, ke *J.R.B.*, kiu verkis raporton pri la Brita kongreso en Weston *ne* estas mi, John Brownlee, honorofica sekretario de E.A.B. kiu foje ricevas la plendleterojn pri la – al la plendantoj – ŝajnaj mankoj en la raporto. Same okazis pri la raporto pri la kongreso en Southampton antaŭ du jaroj.

J.B.

Seksismo en Esperanto

In', pri via in-sufiks',
(Titoldonac' de certa Lolozo),
Vi ne indignu!
Ĉu ne signifas ĝi
Pli multe ol la nul-simbola 'o'?

Inodigna Inami'

Pravas Sally Phillips, kiam ŝi asertas (en n-ro 858), ke makulas eĉ la sengenan Esperanton tiu bedaŭrinda kaj forĵetinda restaĵo el tempoj pli fruaj – la seksismo. Ŝi proponas la uzon de nova sufikso 'iv' por signi la sekson viran. Ĉar, laŭ PAG, 'iva' estas neoficiala sufiksoido (kaj 'iv' estas rigardata kiel ebla pseŭdosufiksoido), mi mem preferus malsaman anstataŭigantaĵon, por ke ĉiu afikso havu unu solan signifon. (Diference de, ekzemple, 'ujo', kies tri sencoj povas kaŭzi miskomprenon).

Provizore akceptante 'iv' tamen, oni tuj konstatas, ke la nova difino de 'viro' estus 'homo' aŭ 'homo plenkreska, adolta'. Krome, per 'iv' oni povus forigi la teorie dubasencan prefikson 'vir'; ĉar tute klara estus 'ĉevalivo', dum la nuna 'virĉevalo' povas signifi ankaŭ 'centaŭro'.

Parolante pri virinoj, iuj esperantistoj evidente ne scias. ĉu ĉiam aldoni la sufikson 'in' al, ekzemple, ĉiu predikativo substantiva – tio estas, ĉu diri (1) *Ŝi estas sportistino* aŭ (2) *Ŝi estas sportisto*. Estas vere, ke en la unua ekzemplo, ŝajnas

superflua la uzo de la sufikso, kiu simple ripetas la saman ideon prezentitan de la pronomo. (Sed en la eksterkunteksta *Mariko estas sportistino*, la sufikso ja estas necesa, se, sciante nenion pri la nomoj japanaj, oni volas sciigi pri la sekso). Legante (1) *La ĉefministro Indira Gandhi* kaj (2) *La ĉefministro Vigdis Finnbogadóttir*, oni supozeble ne dubus pri la sekso de la unua, ĉar ŝi estas pli konata. Ĉu same, tamen, pri la dua? Islandano aŭ homo, kiu ŝin laŭnome konas, aŭ kiu rimarkas, ke parencaj estas 'dóttir' kaj la angla 'daughter', sentus nenian konfuzon. Sed la aliaj legantoj verŝajne estus gvidataj (mise) de la manko de la virina sufikso en la dua ekzemplo, kvankam en la unua ĝia manko estus eble malpli rimarkebla. Do mi supozas (kaj tion konfirmas PAG), ke estas necese ĉiam uzi la sufikson 'in', malgraŭ ke ĝi estas tre ofte superflua kaj povas pezigi la frazon . . . 'La virino estas instruistino, elstara esperantistino kaj krome amata edzino kaj patrino de du filinoj'. Same, se oni akceptus la 'iv'-sugeston de Sally Phillips. Se, tamen, oni konsentus pri la formo *neŭtra* de tiaj vortoj, oni povus diri (en Esperanto kaj en la angla), ke la virino estas 'instruisto, esperantisto, edzo kaj patro de du filoj' ('teacher, Esperantist, married and the parent of two children'). Kompreneble la frazo ŝajnas unuavide tre stranga!

Eĉ plia avantaĝo de tia neŭtreco estus, ke oni povus eviti la pezan formon (tre ofta en la angla) 'ĉiu individua aktoro/aktorino devus zorgi, ke li/ŝi . . .' 'Aktoro', signifus 'iu, kiu aktoras' (ne specifante la sekson). Kaj 'li/ŝi'? Ili simple geedziĝu – 'ŝli'!

Sed ni ĉesu revii! Lingvo, kiu ankoraŭ senzorge permesas la uzon de du aŭ tri nomoj por multaj landoj, certe ne entreprenos tiajn ŝanĝojn radikalajn!

La virinoj en multege da landoj devas elteni unue la familian nomon de la patro kaj poste, se ili edziniĝas, tiun de la edzo – kvazaŭ ili estus ĉiam posedaĵo de iu viro. Krome, kvankam la titolo de ĝen-

tileco 's-ro' aplikeblas egale al fraŭloj, edzoj, vidvoj kaj eksedzoj, la virinoj estas kutime devigitaj uzi aŭ 'f-ino' aŭ 's-ino'. Ĉu jam ne venis la tempo, kiam oni devus enkonduki neologismon por la pli kaj pli enradikiĝanta 'Ms' en la angla? Tion ni ŝuldas al la virinoj, por ke ili mem povu ĝin elekti aŭ ignori.

Haku-mo'olelo-mehameha

Kia ora

Leginte la artikolon de H. S. Chapman pri domnomoj (BE majo-junio), mi ial rememoris la nomon de la Schweppes-a oranĝa trinkaĵo "Kia Ora". Mi trovas interese scii, ĉu tiu nomo havas Esperantan devenon. Ĉu iu scias?

John Green

(Antaŭ tre longe mia patro seniluziigis min ĝuste pri tiu ebleco: li informis min ke "kia ora" estas maoria trinksaluto. Tio konfirmiĝis al mi lastatempe, kiam en novzelanda filmo ricevinto de biero ĝuste tiel salutis sian gastiganton, kiu same reciprokis. Do ne Esperanto, bedaŭrinde!— Red.)

BRISTOL SUMMER REUNION

Bristol Esperanto Society held a Summer Reunion on 16 June, 1984, at Honeycombe Farm, Cribbs Causeway, Bristol, to celebrate the 70th birthday of their veteran member, Frank Buckley. Three of his plays: "Neĝulino", "La Feliĉa Familio" and "La Ĉeĥoslovaka Porko" were performed in the orchard.

Esperantists from Bristol, Bath, Newport, Abergavenny, Bathampton, Cheltenham and Stapleton were present and two visitors, one from Persia and one from France lent an overseas touch.

Honeycombe Farm is Frank's apiary on the old Roman road that led from Sea Mills (Abona) to Gloucester (Glevum) bounded by the little River Trym that runs through Blaise Woods to join the Avon below the Gorge. Visitors spent an idyllic lazy day – except for the Open-Air Theatre activity – among the bees and



fruit trees. Toasts were drunk in champagne (well sparkling perry made locally from pears!) and mead which Frank brews from his honey.

Frank had a most successful reception for his first presentation of "Fifty Years of Esperanto" at the London Esperanto Club recently and he will give this tape/slide programme in France, Germany, Holland, Spain, Denmark and Sweden later this year. Invitations have also been received to visit America, Canada, Poland, Russia, Australia and South Africa.

A welcome visitor to Cribb's Causeway was Herbert Bell who created the part of Napoleono Plunk in "La Feliĉa Familio" at the Weston-Super-Mare British Conference in 1939. He repeated his rôle, remembering almost all the lines and business, and meeting again members of the cast he had not seen for 45 years.

NOVAJ LIBROJ

Mondo de travivaĵoj. Tibor Sekelj. Edis-
tudio Pisa 1981. 288p. 15 x 21 cms.
Prezo £6.70 afrankite.

Plaĉis al mi vidi ke por enkonduko Tibor Sekelj uzas unu el miaj preferataj poemoj, sian: "Mi vizitas mian farmon", kiu unue aperis en jugoslavia poemaro. Lia farmo estas la tuta mondo, kiun li vizitas por kontroli ĉu ĉio "ankoraŭ funkcias kiel ĝi devas", kaj la libro koncernas liajn aventurojn dum la "inspekcia vojaĝo" kiun li faras en sia profesia vivo.

Tibor Sekelj estas estimata kiel esploristo kaj antropologo. Li estas ano de gravaj sciencaj asocioj kaj kelkajn el siaj ekspedicioj li plenumis je la peto de landaj registaroj, kiuj alte taksis lian laboron. Aparte rimarkindaj estas liaj ekspedicioj al nekonataj regionoj, por la kolektado de etnografiaj informoj pri primitivaj socioj, kiam li ne nur observis la vivon de la indiĝenoj, sed eĉ kelkfoje estis permesita partopreni sekretajn ritojn.

La unua ĉapitro kronikas la ĉefajn eventojn de lia vivo: la nombro de liaj entreprenoj tre imponas. Krom vojaĝi, li multe prelegas kaj verkas: Parenteze, el la dek sep libroj listigitaj en la bibliografio, sep estis originale verkitaj en Esperanto, lingvo por li tre grava; li ja multe vojaĝas por, kaj per ĝi.

La entuziasmon por sia profesio la aŭtoro klare montris, kiam pri sia vojaĝo al Aŭstralio en 1970, li skribis: "Kun sento de feliĉo mi denove plonĝis en la mondon de neatenditaj eventoj". Li ne lasas sin ĝeni de malfaciloj aŭ danĝeroj, sed akceptas ilin kiel parton de la vivo. Estas evidente, ke por li, ekkoni la popolojn de la mondo, kaj krei amikecojn valoras ĉiun penon.

La tridek travivaĵoj, ekscitaj kaj mirinde diversaj, estas rakontataj tiel verve, ke la leganto enimage kuniras, vidas majestajn spektaklojn de la naturo, jen troviĝas en la mistika etoso de

hinda templo, jen paŝas inter la muroj kaj monolitoj de antikva majaa urbo. Li ĝuas gastamon en mongola jurto, aŭ sentas timtremon en ŝajne neelirebla situacio. Vere estas aventuro legi ĉi tiun libron; aventuro, kiun almenaŭ mi ripetos fojon post fojo.

La libro estas bone prezentita, kaj ilustrita per fotografajoj. Nur kelkloke la ofsetpresitaj literoj estas neklaraj, sed tio ne malhelpas la legadon; simile troviĝas tre malmultaj prezeraroj.

Rita Thyer

Hungara Antologio red. Vilmos Benczik. Corvina Kiadó 1983. 448p. 24 cm.

Renkonti la hungaran literaturon signifas konstati ĝian vastan liberecon de temoj, precipe en la poezio, kompare kun la angla, kie ĝis la 19-a jc. regis la romantika modo trobadora kaj poste kavalira. Kie en niaj versvolumoj ni trovus ion similan al la penetro en infanan animon de Kosztolányi, la pietaton al patrino de Gellért, fajran liberamon de Petöfi aŭ la universalismon de Madách? Kaj kie en la angla trovi skue pensigajn novelojn kiel en *Norda Vento* de Karinthý? Kia antimilita poemo frapas kun la intima rekteco de *La nokto de libertempa soldato* de Oszkár Gellért? Nu, eĥoj ne tute mankas. Jen *Antaŭ princo Silent'* de Ady:

Sub Lun' mi iras la arbaron.
Dentklakas, fajfas mi dumvoje.
Postdorse venas la dek-klafta
princo Silent'.
Ve, se mi rerigardus foje,
ve al mi, se mi eksilentus,
aŭ al la Lun' rigardus gape,
ve-krio, krako. Ekpaŝegus
princo Silent'
kaj min frakusus piedfrape.

Oni tuj pensas pri jena strofo el *The Rime of the Ancient Mariner* de Coleridge: Like one, that on a lonesome road/doth walk in fear and dread,/And having once turned round walks on/And turns no more his head;/Because he knows, a frightful fiend/Doth close behind him tread.

Kalocsay iam skribis pri la hungaroj: “Ni, en mortdanĝera pordo, inter orient’ kaj okcidento”, kaj efektive tiu duflanka minaco akriĝis la hungaran genion tiel, ke ĉe ni oni jam ŝerce diras, ke hungaro estas homo, kiu eniras en rotacian pordon malantaŭ vi kaj eliras antaŭe! Atestas Alexander Korda, E. H. Gombrich, George Solti, Moholy-Nagy, eĉ George Mikes, Tony Curtis kaj tiu Biro, kiu inventis la globkrajonon. Se ne menciis Pál Lengyel, Baghy kaj Kalocsay mem.

Kiam en 1933 eliris la Hungara Antologio simila verko eĉ en grandaj naciaj lingvoj ne ekzistis pri la hungara literaturo, kaj dum ankoraŭ mankas tiaĵo, jen aperas eĉ dua Hungara Antologio, unu kvaronon pli ampleksa, sed kun ripeto de nur 38 el siaj 226 pecoj (ĉiu prozaĵo estas nove elektita). Do se vi jam posedas la plifruan, la nuna kun *La Tragedio de l’ Homo* (1965) kaj *Norda Vento* (jam ne parolante pri aliaj volumoj) liveros panoramon de hungara literaturo senkompare pli pompan, ol troviĝas en la angla lingvo.

Vilmos Benczik bonege redaktis. Ne nur li verkis enkondukon pli informan ol la antaŭa de Babits, sed ankaŭ liaj prezentaj vinjetoj pri la aŭtoroj estas pli plenaj ol tiuj de Kalocsay, kaj krome li mem tradukis 15 el la eroj.

La ĉefaj el la 18 kunlaborintoj estas M. Fejes, P. A. Rados, I. Szabó kaj J. Varga, ĉiuj bonaj kaj Martón Fejes tre bona. Lian tradukon de la longeta poemo *Aŭtuna ebrio* de Dezső Kosztolányi mi trovis majstra, kaj tre plaĉis de la sama aŭtoro la novelo *Aŭrelius* en traduko de T. Kiss. Varga triumfis ĉe ekzemple *Rozo de Gábor Garai* kaj *Rados per La Anaspied-Palaco de Gyula Illyés*.

Entute: bonega laboro kaj enviinda atingo, kiu favoras nin per tre diversaj riĉoj.

R. Rossetti

Sugestoj Por Kompletigo De La Jura-Diplomatia Terminaro. Red D-ro L. Dubravszky (Hungario) kun Antaŭparolo de Prof. I. Lapenna.

Eldonis Internacia- Asocio de Juristoj (IEAJ) 1984. 27p. (Broŝ). Prezo ne indikita, sed proks. £3.50.

Finfine, mi kredis, la juristoj kuntiris siajn talarojn, senpolvigis siajn perukojn, kaj atakis la bazan taskon prepari ĝisdatan fakterminareton. Ho ve, kiom mi eraris!

Jam delonge oni neglektis juran vortaron en Esperanto, kaj, vere, unu ofte neagnoskita fakto en Esperanto estas ĝuste la manko de specialistaj vortprovizoj.

Kiel diras en la antaŭparolo Prof. Lapenna, la tuto konsistas el du partoj. Serio A entenas novajn vortojn kaj terminojn ne troveblajn en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV), dum Serio B kompletigas per pliaj signifoj plurajn vortojn, kiuj jam troviĝas en ĝi. En 2–3 kazoj temas, fakte, nur pri utila kuraĝigo derivi plian vorton el ekzistanta radiko konforme al la *Fundamento de Esperanto* anstataŭ apliki priskriban metodon, Ekzemple, *advokati* estas nenio alia ol “agi, funkcii kiel advokato”.

En ambaŭ partoj post ĉiu termino sekvas la proksimumaj ekvivalentoj en la franca (f.), angla (a.) kaj germana (g.) lingvoj. Nur por la vortoj RELEGACIO kaj RILEGO estas donitaj tradukoj en la rusa – du tipe sovetiaj punoj. Helpe de tiuj nacilingvaj ekvivalentoj(?) – (krampoj kaj demandsigno tiuj de la recezanto – kaj la vastaj Esperantaj difinoj ĉiu juristo povas facile ellabori por si mem nacilingvan – Esperantan referencan vortareton por havi ĝin ĉemane dum la verkado de tekstoj pri juraj – diplomatiaj demandoj. Kelkaj el la terminaroj estas difinitaj en kunlaboro kun Prof. Lapenna: la ceteraj apartenas al la aŭtoro.

La Internacia Esperanto – Asocio de Juristoj (IEAJ) decidis eldoni “tiun ĉi valoran verketon” de D-ro Dubravszky (citiloj tiuj de la recezanto) kiel sian unuan kontribuon al la Jubilea Esperanto – Jaro 1987. Ĝi estas reviziita eldono de la samaj *Sugestoj* publikitaj en *Internacia Jura Revuo*, numeroj 1 k 2/79

kaj 1/80.

Nun staras la memevidenta demando – kial la aŭtoro sin limigis al nur tri kontrol-lingvoj? Kio ajn okazis al la latina, la prestiĝa lingvo de tiom da juristoj en tiom da landoj?

Ni nun konsideru, alfabete, kelkajn el la vortoj en Serio A de la libreto (kiu, ial, komencas ĉe “d”) jene:–

(i) DENONCI. f. dénoncer, a. to give notice, g. kündigen. – Sciigo per kiu unu partio komunikas al la alia ke ĝi post preskribita tempodaŭro ne plu konsideras valida la ekzistan jurrilaton inter ili. Supozeble ĝi estas verŝajne pli belsona ol “doni avizon al”, sed ĉu ĝi devas sklavece sekvi unu el tiuj tri lingvoj?

(ii) DESAPONTI. (Vorto de K. Kalocsay). f. désappointer, a. to disappoint, g. enttäuschen. Persone mi preferas “trompi la esperojn” aŭ “malkontentigi”. La latina “*Frustrari*” donus “frustri” – al mi, pli trafa.

(ii) DESAVUI. f. désavouer, a. to disavow, g. in Abrede stellen. Laŭ mi, “fornei” – estas tute trafa, kaj la latina povus doni almenau “repudii”.

(iv) EKVITO. (Vorto de Ernest Goulding). f. équité, a. equity, g. Gerechtigkeit, Billigkeit. Laŭ mi la latina proponas solvon – *fas* – do *faso*, aŭ eĉ *aequitas* do, *ajkvo* aŭ *ajkvitato*, aŭ eĉ *ekvitato*.

(v) INKVESTO. f. enquête, a. inquiry, g. Untersuchung. Prof. Lapenna aldonas ke “la vorto ‘enketo’ ne taŭgas!” Kial ne, klera Profesoro? Ni analizu tiun vortacon – Ĉu ĝi konsistas el “link” kaj “vest” kiel radikoj? Nepre ne, mi esperas! En la originalo de tiu ĉi Serio A, “Inkvesto” aperis kiel “Inkuesto” – laŭ mi, sendube preferinda.

Aliajn vortojn mi tute ne akceptas, kiel ekz. “Manaĝi”, “Manteni”, “Ŝmugli” ktp. Aliajn mi nepre bonvenigas – ekz. “Klado”, “Preamblo”, “Pandaro”, sed unu vorto senekvilibras min. Tiu estas “Talvego” (Vorto de A. Albaut). Laŭ “Sugestoj”, “Talvego” en la angla signifas “middle course”. Nepre ne. Tiu estas *mezlinio*. “Talvego” fakte aperas angle kiel “Thalweg” aŭ “Tal-

veg”, kaj estas *tre* rara geografia termino.

Rilate Serion B, mi ne povas diri multe, krom noti ke “Tutoreco-Kuratoreco” ne troviĝas en PIV. Tamen la vastigo de senco ĉe kelkaj vortoj estas multe posttempa, sed tre tre bonvena.

Tre bedaŭrinde, la libreto ne donas plenan liston de ĉiuj juraj esprimoj. Mi bonvenigas iujn utilajn esprimojn: “jurasisto”, “renonci”, “pupŝtato” ktp, sed ĝi entute malsukcesas doni klaran gvidon pri pli precizaj temoj, kiel oni trovas en vendkontrakto, kompania juro kaj heredo: ĉiuokaze tiuj ĉi estas ĉiutagaj aferoj por verŝajne la plimulto da juristoj (krom, eble, por tiuj kiuj funkciigas la jurasistajn skemojn), kaj dum mi bonvenigas la aperon de la verketo/verketo kiel nura *helpilo*, ĝi entenas laŭ mia vidpunkto, tro da “sugestoj”, kiujn la t. n. “puristoj”, diferencaj de mi, ne estos pretaj akcepti.

Ĉion zorge konsiderinte, mi ne povas rekomendi la aĉeton de tiu ĉi libreto. *Kontribuo* al la Jubilea-Jaro jes, ĝi certe estas – sed preskaŭ nenio pli.

R. E. C. Thom.

NEKROLOGO

Mortis en majo 1984 **Douglas P. Boatman**, Lyme Regis, membro ekde januaro 1925. Li verkis la originalajn romanojn *La nekonata konato* kaj *Kara diablino*. Kondolencojn al lia edzino.

PROF. COLLINSON

Se iu leganto scias aktualan adreson de familianoj de nia karmemora Prof. Collinson, tiu bonvolu kontakti kun la redaktoro de la BE. Antaŭdankon.

BONVENON AL SOUTHWELL MINSTER

Dank’ al nia samideano H. Fillingham, kiu havigis la tradukon, vizitantoj al Southwell Minster (apud Nottingham) jam povas ricevi informbroŝuron en Esperanto. Kunlaboris en tiu ĉi sukceso ankaŭ s-ino C. M. Howell. Niajn gratulojn al ambaŭ!

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj.
Antaŭpagenda.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Brislington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount,

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

‘Kieva Esperanto-klubo de internacia amikeco “Ora pordego” volas montri al la publiko eblecojn kaj disvastiĝon de Esperanto. Nun en la mondo estas tre aktuala problemo de la mediprotektado. Ankaŭ ni volas kontribui al ĉi nobla afero. Ni volas kolekti afiŝojn kaj aliajn ekspozicieblajn materialojn pri la temo el la tuta mondo por organizi fine de la jaro ekspozicion “Nia hejmo – Tero”. Krome ni kolektas ankaŭ afiŝojn pri kontraŭfuma kaj kontraŭ – alkohola temoj. Ni tre petas vin helpi al ni. Ni pretas helpi al vi en similaj aranĝoj. Anticipan dankon!

Sovet-Unio 252200, KIEV, p.k. 539/1, Lineckij Miĥail.

Belga diamantprilaboristo (52) (vidu Jarlibron: FD diamantoj) serĉas kontakton kun samideanoj el la metio de oro, arĝento kaj altvaloraj gemoj. Skribu al: Hubert Magis, Zeelputten 4, B-2410 HERENTALS, Belgio.

Mi bezonas malnovajn kaj modernajn poŝtkartojn (ĉiuj temoj akceptataj) por organizi ekspoziciojn en diversaj lokoj oficialaj: ministerioj, grandaj entreprenoj, k.t.p. Ni ĉiuj nepre konsideru la gravan propagandan flankon de tiu entrepreno. “Malpolveru” viajn arkivojn kaj sendu al:
w-ro GICQUEL Claude, 38, rue Babeuf, 94600 CHOISY-le-ROI, Francio.

LONDONO 70KAS

La historio de la unuaj 75 jaroj
de la Londona Esperanto-Klubo,
verkita de Harry Holmes.

A5, kun 132 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.
£3, aŭ ekvivalento. Mendu ĉe BEA,
UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte de
la Londona Esperanto-Klubo,
153 Drummond Str., London NW1.
Ĝirokonto 54 661 0005.

Volas korespondi:

TANG Xiaoxuan, 39-jara Ĉina instruisto de angla lingvo kaj literaturo en kolegio, amas Esperanton, ŝatas lingvistikon, literaturon, historion, muzikon kaj filatelon; volas korespondi kun geinstruistoj, gestudentoj kaj aliaj homoj. Adreso: English Dept., Yancheng Teachers' College, Yancheng, Jiangsu, China.

Klubo de 11/12-jaraj lernejoj en Malta volas korespondi. Skribu al Klubo Tutmonda Amikeco, Il-Liceo Tas-Subien, Triq Mons. De Piro, Hamrun, Malta.

Ewa BOGUSZEWSKA, 63-600 Zepno, ul. Wiosny Ludow 6/3, woj Zaliskie, Pollando, 23-jara volas korespondi. Ŝatas muzikon, poezion, dancadon, poŝtmarkojn, poŝtkertojn kaj vojaĝi.

Tadensz Lisowski, juna Polo interesiĝas pri ĉio, kio koncernas vojaĝadon kaj precipe en la koro de Asio. Wybickiego 37 m.l. Torun 87-100, Pollando. Ankaŭ scipovas la anglan.

S-ro Cy Stephenson, 79 Tremarle, Camborne, Cornwall. TR14 0AT estas instruisto de Esperanto kaj liaj klasanoj deziras korespondi per letero kaj kaseda letero kun iu ajn, iu aĝo, ĉiuj landoj, pri diversaj temoj, Angle, Esperante, Hispane.

Zbigniew *Siekierski*, 26,600 RADOM, ul. Sadkowska 13 m8, Pollando 28-jara samideano kolektas bildkartojn, diapozitivojn, poŝmarkojn kaj interesiĝas pri distra muziko.

Gavid Rahiemenia, 19-jara, Waliasr Str. Mochtarei Str. Ale Ordebehesht N-ro 39, Tehran, Iran volas korespondi kun knabino Brita.

Uosef Rahiemenia, 16-jara, sama adreso kiel supre sed n-ro 39 volas korespondi kun knabino Brita.

Ghasem Yousefi, Daftar Agorpazi Mihan, Karaj Serah Gohardasht, Iran. volas korespondi kun knabino Brita.

Prof. Yang Ge, Foreign Language Dept., Hua Chiao University Chuanchow, Fujian, Ĉinio volas korespondi.

Liu Bing Jun, 171 Bei Da Road, Fuzhou, Fujian, Ĉinio. Volas korespondi.

Li Ying Ming, Chen Meng Middle School, Fuzhou Suburb, Fujian Ĉinio volas korespondi.

46-jara fraŭlo kun fraŭlinoj;
s-ro Shafi Rashidi, 36 Sogol ave,
Vali ASR TABRIZ, 51578, IRANO

35-jara insruistino de bulgara lingvo kun iu el Britio;
C. Ivanova, 'G. Nikolov' 7,
BG-5400 SEVLIEVO, Bulgario

Pri Bildkartoj, Vladka Kaňková,
Delnická 1383,
40747 VARIJSDORF VIII, Ĉ.S.S.R.

24-jara kemistino pri turismo,
Esperanto-movado, fotografado k.a.
Grazyna Mirkiewicz, 50-501 WROOLAW
ul. Hubska 119/34, Pollando.

Stephen Jones, 13-jara knabo, nova Esperantisto, volas korespondi kun eksterlandanoj. 4 Riverside Grove, Wainuiomata, Nov-Zelando.

Josef SUČIK, 21-jara serĉas leteramik(in)on. Hobioj, muziko, amatora filmado, literaturo kaj arto. Adreso: - 70500 Ostrava-Hrabuvka, Provaznicka 47/961, Ĉeĥoslovakio.

INTERNACIA ESPERANTO – SEMAJNO en NICO

ĉe la Lazura Marbordo

de la 30a de Marto ĝis la 6a de Aprilo 1985

MATENE : KURSOJ (5-gradaj) – POSTTAGMEZE : EKSKURSOJ
Tutgaste, 3manĝoj potage, dupersona ĉambro en hotelo kun bano/duŝo.

Ĉio enkalkulite : 1395 FF – Infanoj kaj studentoj : 900 FF

ALIĜO-LIMDATO : 1a de OKTOBRO 1984

Informo kaj aliĝo ĉe: LLORENS "Hortensias 2" . 121bis Boulevard
Napoléon III. NICE. F.06200.

ESPERANTO, The International Language

A Complete Textbook

by Rev. Downes

Explains the grammar. Gives many examples, with exercises and a Key.

Price £3.50 (inc. p.)

Order from the Esperanto Centre, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF